Julio 2008
Januaro 2009

Enhavo

1 Nova jaro komenciĝas

3 Aliflanke de la Rejno

4 Listo por informiĝi

4 Forpaso de pola figuro

5 Kaj unu lingvo plia !

6 Persona adopta lingvo, ĉu bona ideo ?

2009, ĉu jaro de eŭropa renoviĝo ?

Novjarajn dezirojn

Unue lasu nin prezenti al vi niajn sincerajn bondezirojn por tiu ĉi nova jaro. Ni deziras ke tiuj etaj momentoj, kiuj spicas nian ekziston, solidaraj gestoj, familiaj ĝojoj, varmkoraj momentoj kun viaj geamikoj, la espero pri pli bona mondo ebligos al vi pasigi sencoplenan jaron. Ni esperu ke la kunigo de la diversaj krizoj, kiujn ni trapasas, konsistigos saltotabulon al pli racia socio, kiu loku la Homon kaj ties vivmedion en la koron de nia zorgaro.

2009 estas rendevuo kun la eŭropa estonteco. Estos okazo niaflanke diri ke eŭropa konstruado ja estas bona ideo, sed ke ĝis nun ĝi suferas gravajn mankojn. Sed por vetfronti la defiojn de la 21a jarcento, ni bezonas Eŭropan Union. Ĉiu lando sendepende ne multon povas fari kaj kune ni devas antaŭeniri. Ni vetu ke Eŭropo estos tiu laboratorio de ideoj, kiuj donos sencon al la estonteco kaj kiu ebligos sur pli bone respektata planedo certigi disvolvadon por futuraj generacioj. Ni deziras ke Eŭropo, spite sian ekonomian potencon, ne kondutu trans siaj limoj kiel superrega potenco, sed kiel modelo de humanista socio.

Por antaŭeniri, gvidfolioj ekzistas de multaj jaroj, sed multo restas farenda por ilin apliki. Tiuj gvidfolioj interalie nomiĝas la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj aŭ ankaŭ la principoj pri daŭrpova disvolviĝado. Cetere, ni konsideru tiun lastan koncepton kiel multe pli ampleksa ol kion aŭdigas kutime amaskomunikiloj almenaŭ en Francujo, kie oni ĉiam pli parolas pri naturmedio kaj energio. Alimaniere enloĝi la morgaŭan Eŭropon, estas interalie respekti la principojn pri bona regado. La agendo 21 kiun oni starigis dum la tuttera pintkunveno de Rio-de-Ĵanejro en 1992 invitas progresi al demokratiaj reĝimoj ebligantaj la plenan partoprenadon de ĉiuj koncernaj partoj, sed kiu estas hodiaŭ la loko de civitanoj en Eŭropo? Ĉar promociado de lingva kaj kultura diverseco, kiu apartenas al la

kadro en kiu daŭrpova disvolviĝado plej sencas, bona regado en Eŭropo ebligus al « regatoj » esprimiĝi kaj dialogi egalrajte, sen endanĝerigi la ne materian heredaĵon de nia kontinento. Daŭrigi la konstruadon de Eŭropo apud-estigante naciajn debatojn limigas la perspektivojn ene de niaj naciaj landlimoj kaj forigas nin de komunaj ambicioj. Preter ŝtataj sistemoj, nia plurlingva politika spaco kiu estas Eŭropa Unio bezonas kungluiĝemon inter siaj civitanoj kiuj ofte pli fruas ol ĝiaj regantoj koncerne la volon ŝanĝi. Pli pezigi gecivitanojn sur la politika pezilo estas provizi al Eŭropo energion por antaŭeniri, konduki ilin al kuna laborado, favorigi iniciatojn kiuj eble konsistigos morgaŭajn alternativojn.

Ĝuste kiam Europa Unio plu kaj daŭre palpserĉas sian evolu-vojon, tempo venis por novmaniere agi. Por sukcesi ekzistigi tiun eŭropan renoviĝon, kial reinventi radon? Neŭtrala, riĉa kaj viva lingvo jam de pli ol unu jarcento pruvis sian kvaliton kaj hodiaŭ atendas nur politikan kuraĝon por profiti al la plej multo. Tial, nia elstara kaj originala propono estas promociado de plurlingvismo kaj paralela uzado de Esperanto kiel EU-komuna lingvo. Evidente ni ne nepre povos mallongperspektive ŝanĝi profunde la lingvan politikon de la Unio, necesos prudente kaj pragmate antaŭenpaŝi, sed ĉu daŭrpova disvolviĝado ĝuste ne invitas nin konsideri laŭ pli longa perspektivo niajn politikojn? Sed sur la kampo de lingva politiko, longperspektive nenio maleblas kaj kun konvinko ni defendos, spite niajn limigitajn monrimedojn, vizion de plurlingva Eŭropo kiu donos al la plejmulto aliron al internacia komunikado. Ni estas certas pri tio, ke esperanto povas fariĝi la volbo-tena ŝtono de eŭropa civitaneco respektanta ĉiun individuan identecon. Ekuzi Esperanton evidente ne estas celo en si mem, sed rimedo por atingi nian celon kiu estas konstruado de civitana Eŭropo. Ni kalkulas kun vi por ke en 2009, vi alportu surterene, dum la kampajno aŭ simple en la voĉdonujoj vian subtenon al vizio de demokratia kaj aŭdaca Eŭropo, kiun ni subtenas. La 7an de junio, donu ŝancon al Eŭropo de gecivitanoj.

Fondo de EDE-Germanio

Konstruitia por biciklistoj kaj piedirantoj, la ponto de la parko de la du riverbordoj ligas ambaŭ partojn de la translandlima samnoma parko inter Germanio kaj Francio en Strasburgo. Maldekstre, la statuo de repaciĝo.Tiun jaron, EDE etendiĝas orienten kaj aparte aliflanke de la Rejno.

Membroj de la estraro de EDE-Germanio
De maldekstre dekstren Dr-o. Ulrich MATTHIAS, Alfred SCHUBERT, Dr. Eugen MACKO, Konrad GRAMELSPACHER, Manuel CEBULLA.

EDE DISVASTIĜAS ORIENTEN

Kiel la solaj civitanoj povintaj voĉdoni por Eŭropo Demokratio Esperanto okaze de la lastaj eŭropaj balotoj en 2004, francaj civitanoj sentos sin malpli izolitaj en 2009 ĉar devus esti eble al aliaj enloĝantoj de Eŭropa Unio voĉdoni favore al eŭropa demokratia renoviĝo. Naciaj sekcioj naskiĝas en pluraj aliaj landoj de la Unio kaj interalie en Germanio, kie niaj gekolegoj ja intencas ĉeesti voĉdoneventon. La germana sekcio de EDE estis oficiale fondita la 5an de julio en Wiesbaden. En Germanio, eŭropaj balotoj okazas federacinivele dum Francion oni distranĉas en diversajn balotdistriktojn. La germana EDE-sekcio decidis prezenti nur unu liston por la tuta lando. Balottempe, la listo enhavu inter 12 kaj 15 personojn kaj surprizige la germana listestro estos... Nobelpremiito! Efektive Reinhard Selten, Nobelpremiito pri Ekonomio en 1994 decidis igi sian famecon servi la EDE-ideojn. Ĉar li mem estas esperantlingvano, li bone scias kiom esperantouzado povus esti boninflua por la konstruado de civitana Eŭropo. Se tiu ekpaŝo de germanaj aktivuloj por ebligi al EDE aŭdigi siajn ideojn aliflanke de la Rejno estas bona novaĵo, ja restas tamen ankoraŭ ne neglektenda obstaklo por ebenigi: kolektado de 4000 subskriboj. Ne temas nur pri surstrata aŭ ĉebuda petado al germanaj civitanoj subskribi subtenan formularon, sed poste pri peto al urbodomoj atesti la loĝlokon kaj aŭtenton de ĉiu subtenanto, kaj tio ja estas pli komplikaĵo. Se vi estas germanino aŭ germano, ne hezitu alporti vian subtenan subskribon kaj eĉ trovi aliajn subskribemulojn. Ĉia helpo estas bonvena!

Du ŝlosilaj ciferoj: 0,5 kaj 5

En Germanio, partio devas nepre regule prezentiĝi al federaciaj balotoj por laŭleĝe ekzisti. Ĉar la germana EDE-sekcio ne havas aliajn celojn ol kandidatiĝi je eŭropaj voĉdoneventoj, germanaj EDE-anoj decidis ne krei partion, sed politikan asocion. Male al kio okazas en Francio, voĉdoniloj ne estos financataj de kandidata organizaĵo sed de la ŝtato mem kiu preparas por ĉiu voĉdonanto unununuran voĉdonilon. Sur la voĉdonilo estas presita ĉiuj balotlistoj kandidataj kaj la balotanto noĉas unu el la listoj, kiun li subtenas. Por ekhavi deputiton ĉe la eŭropa parlamento en Germanio, estas necese preteratingi 5% de la voĉdonoj, kio estas sufiĉe malfacila. Kompreneble, tia situacio tamen estus bonvena tiel simbole kiel por subporti niajn ideojn konkrete. Interesa afero en Germanio estas ke ekde 0,5% de la voĉoj, EDE povus en tiu lando ricevi ĉiujaran subvencion egalan je 0,85 eŭroj por ĉiu voĉo. La rikoltota sumo ebligus poste profesiigi la laboron de la germana EDE-sekcio kaj financi gravajn komunikkampajnojn pri niaj ideoj kaj subteni la Esperanto-asociojn. Ja eblas superi 0,5% de la voĉoj en Germanio. Germanoj efektive kutimas pri etaj partioj, de la virinopartio tra tiu de aŭtouzantoj ĝis tiu de komputikaj piratoj ! Dum la lastaj ne eŭropaj germanaj balotoj, etaj partioj unutemaj ofte atingis rezultojn preter 0,5%. Ekzemple, la partio por bestoprotektado atingis 1,3%, la partio de la familio 1% kaj la virinopartio 0,6% de la voĉoj. Ni vetu ke EDE atingos honorindan rezulton kaj montros sin kiel freŝnova proponforto por konstrui demokratian Eŭropon respektanta ĉiun identecon.

Retaj listoj

La francaj diskutlistoj ekzistantaj de kelkaj jaroj estis ŝanĝitaj en oktobro. Ni informas niajn simpatiantojn ke la malnova diskutlisto edefrance@yahoogroupes.fr estis senaktivigita kaj ke informlisto estis anstataŭe malfermita. Abonantoj ricevos unu mesaĝon en monato. Por aliĝi, sendu malplenan mesaĝon al europe-democratie-esperanto-subscribe@googlegroups.com. Ni memorigas ke ekzistas ankaŭ germana kaj eŭropa diskutlistoj. Por aboni, jen la laŭvicaj abon-retadresoj: europa-de-subscribe@yahoogroups.de kaj ede-eu-subscribe@googlegroups.com.

Malapero de granda pola figuro

Bronislaw Geremek forpasis en aŭtoakcidento en Pollando dum julio 2008. Eksa eksterlanda ministro, vic-prezidanto de la Eŭropa Parlamento, li estis figuro de la transformo al demokratio en Pollando. EU-deputito, en sia junaĝo li lernis kaj uzis esperanton. En januaro 2008, li akceptis reprezentantojn de EEU kaj konsilis al ili krei interpartian deputitaron favoran al esperanto en kiu li estus partoprenonta. En lia lasta mesaĝo antaŭ lia forpaso la 13an de julio 2008, la profesoro Geremek invitis nome de dekkvino da deputitoj siajn kolegojn debati pri plurlingvismo en Eŭropo kaj interalie pri la rolo de esperanto. La diskuttemon oni tiel proponis: Esperanto, ĉu amiko aŭ malamiko de multlingvismo ? La debato dezirita kaj alvokita de Geremek tamen okazis, prezidata de slovena EU-deputitino Ludmila Novak. El inter la trideko da ĉeestaj homoj, ĉeestis 6 eŭropdeputitoj. Unu el la ĉeestaj parlamentanoj kun germana origino traktis Esperanton kun ia skeptikismo juĝante ke la internacian lingvon estas teorie bonaĵo sed praktike fiasko. Aliaj parlamentanoj ĉeestantaj montris sin pli favoraj kaj alvokis enkondukon de Esperanto kiel studobjekto pro ĝiaj lernofaciligaj kvalitoj. Kreon de inter-partia grupo de EU-deputitoj favoraj al Esperanto cetere oni menciis.Espereble la balotoj en junio maturigos tian grupon.

Bronislaw Geremek

en sia kontribuaĵo por la gazeto Le Monde (eldono de la 28a de junio 2008) konkludis ke Eŭropo estas frontanta "gravan elekton". Temas pri elekto inter "vojoj eluzitaj" de la "eŭropa rutino" kaj "nova etapo de eŭropa unuiĝo". Tiu nova etapo konsistus "kaj el farado de necesaj instituciaj reformoj kaj el demando pri sia opinio al eŭropaj civitanoj".

Kaj unu plia lingvo !

Ili estis 7, ili bonvenigis fratinon. La unua televida multlingva informservo en Eŭropo, la internacia kanalo Euronews la 12an de julio aldonis la araban al sia lingvaro (franca, angla, germana, itala, hispana, rusa kaj portugala). Tra tiu oka lingvo, la kanalo elsendos al la 250-milionhoma araba publiko, 15 milionoj el ili estas cetere nombrita en Eŭropo. La araba jam estis enkondukita en la 90aj jaroj kaj forlasita. Pro kalendara hazardo, la readopto de la araba okazis unu tagon antaŭ la fonda pintkunveno de la Unio por la Mediteraneo.

Kvar foje pli da spektateco ol CNN en Eŭropo

Dezirita de la francoj François Mitterrand kaj Raymond Barre, la kanalo estis kreita la 1an de januaro 1993. La celo de tiu kanalo, kies sidejo troviĝas en Liono en Francio, estis kontraŭpezi CNN post ties partia raportado pri la Golfa milito. Tiam oni ankaŭ celis, sur la aŭdvida kampo, vivigi la Eŭropon de Maastricht. 15 jarojn poste, la kanalo estas en Eŭropo kvarfoje pli spektata ol CNN kaj okfoje pli spektata ol BBC world, kun 6 ĝis 7 milionoj da ĉiutagaj spektantoj. Euronews trafas 210 milionojn da hejmoj en la tuta mondo (90% en Eŭropo) kaj 1,5 milionojn da hotelĉambroj.

Ĉu tiel plu pli da lingvoj ?

La orienta Azio kaj Magrebo (same kiel Rusujo) estas mondskale najbaraj regionoj de Eŭropo. Estas grave ke ni priflegadu proksimajn rilatojn kun ili kaj tial, ni gratulu pri ekelsendado de la kanalo trans la lingvaj limoj de la Unio. Tamen, ni ne forgesu ke 30% da eŭropanoj daŭre ne havas aliron al la informoj tra Euronews en la oficiala lingvo de sia lando. La aldono de lingvo kostas al la kanalo 5 milionojn da eŭroj. Apud tiu fakto, en 2006 institucia tradukado kostis 800 milionoj da eŭroj al EU. Se neniu dubas pri la utileco de tiaj traduklaboroj, ĉu ne indus elspezi po 5 milionojn da eŭroj jare por ĉiu mankanta lingvo, sumo ne tiom grava por ŝtato kaj kiu lingve trafus milionojn da civitanoj?

Fonto: Vikipedio

Komisionano pri multlingvismo ORBAN (maldekstre) kaj Amin MAALOUF (dekstre) diskutas en Bruselo.

Persona adopta lingvo, ĉu bona ideo?

La komisiono taskigis la franc-libanan verkiston Amin Maalouf pripensi la defion, kiun konsistigas la lingva diverseco. Tiu lasta sugestis ke Eŭropanoj lernu, krom ilian gepatran lingvon, ankaŭ internacian porkomunikan lingvon kaj personan adoptan lingvon, kiu povos esti ajna lingvo de Eŭropo. Laŭ A. Maalouf, tio havus la interesaĵon ke «ĉiu el la eŭropaj lingvoj havu, en ĉiu el la EU-landoj, signifan grupon de kompetentaj kaj forte motivitaj parolantoj» por atingi teksadon de duflankaj rilatoj. Tiu propono kiu sufiĉe ion novigas meritas nian atenton. Efektive, neniu ĝis nun ekhavis la ideon disvolvi iuspecan «koran dulingvismon» kiu ebligus pliigi la nombron de homoj kiuj baniĝas en pliriĉiga dukultureco, tiu ĝis nun estis plej ofta privilegio de minoritata parto de la populacio devena de dunacia familio. Tamen, eĉ se tiu ideo ŝajnas interesa kaj malavara, konvenas pluraj nuancigoj.

Unue, kiel Amin Maalouf mem diris, nia kuncivitanoj elektus sendube la anglan kiel internacian komunikan lingvon dum oni devus povis liberigi sin de tia subkomprenita devigo koncerne elekton de unu el ambaŭ lingvoj lernotaj. Idealo estus efektive ke niaj kuncivitanoj tute emancipiĝu pri konstruado de propra lingva identeco, surbaze de sincera interesiĝo por jena aŭ tia lingvo, por tiu aŭ jena kulturo. Kompreneble, la anglan oni povus ankaŭ elekti sed nur se eĥas profundan interesemon pri la lingvo aŭ kulturo de ties parolantoj. Ni atentu ke la « persona adopta lingvo » menciita de la raporto Maalouf, ne estu nur pilolo por igi nin gluti pseŭdan oficialigon de la angla kiel komunika lingvo.

Due, kiel helpi la homojn interesitajn de la demarŝo havi personan adoptan lingvon, ekde ilia junaĝo, elekti unu aŭ alian korlingvon? Same kiel oni inicias infanon al pluraj muzikiloj antaŭ ol peti al li proprasente elekti unu el ili, ĉu ne devus infano familiariĝi pri diversaj lingvoj sen nepre lerni ilin? Instruante Esperanton en bazlernejo, emfazante ekzemple per ludoj pri kio komunas kun aliaj lingvoj, igante aŭskulti diversajn lingvojn al infanoj, oni donus al lernantoj tre bonan enkondukon al lingvoj ĝenerale kaj tio samtempe donas aliron al internacia komunikado kaj preparas ilin al posta lernado de pli malfacilaj lingvoj.

Fonto: Springboard to languages

Springboard to languages

Kontraŭmense al la kliŝo laŭ kiu britoj ne lernas fremdajn lingvojn ĉar laŭdire la internacia lingvo estas ilia, kvar britaj lernejoj lanĉiĝis en provprogramo de instruado de esperanto. La programo estas nune eksperimentata kun infanoj inter 7 kaj 11 jaraj. Kial esperanto, tiu mirinda pedagogia trezoro, estu nur rezervita al minoritato? Por pliaj informoj, legu nian numeron de marto 2008.

Trie, en landlimaj regionoj, kiu estus la loko de la lingvo de la najbara lando en la lingvoelekto proponita de la raporto Maalouf? Landlimaj loĝantoj estos devigataj elekti lingvon de limtuŝa lando kiel adopta lingvo? Same, kia estos la loko de regionaj lingvoj?

Fine, kaj jen eble la plej grava afero, voladi lerni plurajn lingvojn en sia vivo estas antaŭ ĉio mensa agordo. Tiu etoso disvolvinda en la popolo sendube konsistigas ŝlosilon de ia sukceso koncerne niajn lingvajn politikojn. Efektive, azenon ne soifan oni ne trinkigas. Individua plurlingvismo estas vet-atingaĵo por la eduksistemo, kaj igi la tutan popolon regi plurajn lingvojn necesigus eĉ pli da tempo kaj postulus gravajn rimedojn. La demandon pri rimedoj cetere oni ne neglektu. Kiom kaj kian monrimedon oni uzu por atingi tiajn celojn? Ĉu plurlingvismo personigita por ĉiu persono ne riskas restadi privilegio de elito? Spite al bonaj intencoj, ĉu tia plurlingvismo ne riskos derivi al tutanglalingviĝo? Disvolvado de kultivemo al plurlingvismo laŭdindas kaj estu parto de ĉiu lingva politiko. Tamen, surtronigi dogmon pri plurlingvismo sen estingi ĉian tenton de hegemonio de lingvo super alia per paralela uzado de neŭtrala lingvo, tio signifas fine lasi sin suĉi de la allogiva povo de la angla.

Nur Esperanto ne estas dezirinda solvo. Plurlingvismo sen akompanaj agoj ne vivpovas. Nova lingva politiko integranta diversajn aspektojn estas inventenda. Tia lingva politiko devus disvolvi pasivan interkomprenadon, individuan plurlingvismon, sed ankaŭ garantii aliron al plejparto al internacia komunikado, al lingva justeco kaj respekton de ĉies lingvoj. Plurlingva konstruaĵo sen volbo-tena ŝtono kolapsos. Esperanto estas volbo-tena ŝtono kiu alportos al plurlingvismo tian stabilecon, kian ĝi bezonas.

FT

Fotofontoj

Kapobildoj
@fotolia.com
© donibane64
© Franck Gobbo
© Jaimie Duplass
© Stephi
© Rey Kamensky
© id 4078

Redaktado kaj enpaĝigo
Fabien TSCHUDY
Kontakto
redakcio@e-d-e.org
www.demokratio.eu